

Monumento

honore al Joachim Gießner Esperanto plu kaj plu videbliĝas en la Esperanto-urbo Herzberg

Memormonumento honore al la elstara kaj multtalenta Esperanto-pioniro Joachim Gießner estis solene inaŭgurata sabaton, la 30an de junio, en Herzberg. Mintrajna vagoneto kun tabulo, sur kiu surestas dulingva etbiografio memorigas pri Joachim Gießner kaj lia 50-jara aktiva agado. Krome nova ŝildo malantaŭ la vagoneto bonvenigas la alvenintojn en „Herzberg – la Esperanto-urbo“.

La Herzberga fervojisto kaj estro de la fervoja stacidomo Gießner (1913 ĝis 2003) dum multaj jaroj estis prezidanto de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), kaj de 1968 ĝis 1990 li estis prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Li ankaŭ estas tre konata pro sia ampleksa traduka laboro, ĉefe de kantoj.

La solenan inaŭguron ĉeestis inter aliaj: la urbestro de Herzberg Gerhard Walter, la prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) Achim Meinel, s-ro Pätzold de la sociala fervojista fondaĵo Stiftung Bahn-Sozialwerk, Ulrich Mattke kiel muzikisto kaj amiko de Joachim Gießner – kiu festparolis pri la elstara laboro far Joachim Gießner rilate tradukadon de kantoj al Esperanto kaj GEFA-prezidinto Rolf Terjung (kiu kolektis la mondonacojn de la membroj de GEFA kaj IFEF por la monumento).

La du novaj Esperanto-objektoj en la antaŭ-stacidoma parko en Herzberg estas du el multaj signoj, ke Esperanto vere iĝas videbla en la Esperanto-urbo Herzberg. Dum la venontaj monatoj la urbo preparos 11 belajn bonvenig- respektive revidsalutajn ŝildojn en Esperanto ĉe la enirvojoj al Herzberg. Por 2008 kvar grandaj blukoloraj oficialaj urboŝildoj kun la teksto: “Esperanto-Stadt Herzberg” (“Esperanto-urbo Herzberg”) estas planataj ĉe la stacidomaj kajoj.

Esperantlingva urboprospekto estas preparata kaj kvar diverstipaj Esperanto-bildkartoj pri Herzberg baldaŭ

aperos. Krome, la manĝokartoj de 20 restoracioj en Herzberg estas aktuale esperantigitaj.

La urba konsilantaro de Herzberg decidis la 11an de julio 2006, ke Herzberg oficiale portos la kromnomon



La nova monumento honore al Joachim Gießner en Herzberg post la inaŭguro, la 30an de junio 2007

„die Esperanto-Stadt“ / „la Esperanto-urbo“. Ekde multaj jaroj Esperantorenkontiĝoj kaj -arangoj okazadas en Herzberg, kiuj altiras multajn esperantistajn gastojn. Tie troviĝas la Interkultura Centro Herzberg (ICH), la centra klerigejo de la Germana Esperanto-Asocio kaj sidejo de la germana sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), krome la oficejo de la Esperanto-Societo Sudharco, kiu ligas Esperantistojn de la regiono. Esperanto estas instruata en ĉiuj lernejoj de Herzberg. Esperanto ankaŭ estas oficiale uzata kiel pontlingvo en la rilatoj kun la pola ĝemelurbo Góra kaj ebligas senperan komunikadon inter la loĝantoj de Herzberg kaj de Góra.

Thomas Sandner

Urboprospekto haveblas

La unua kolora urboprospekto pri Herzberg – la Esperanto-urbo nun haveblas. Krome ni nun havas kvin diversajn belajn bildkartojn pri Herzberg – la Esperanto-urbo kaj Interkultura Centro Herzberg (ICH). Per aĉeto vi iom subtenas la nemalmultajn taskojn por Esperanto en reala vivanta medio. Se vi volas havi nur la novan esperantlingvan urboprospekton sen bildkartoj skribu al: Stadt Herzberg am Harz – Touristinfo, DE-37412 Herzberg – die Esperanto-Stadt, Germanio

*Petro Zilvar,
Marika Frense,
Zsófia Kóródy*

Pli ol

40 objektoj

En Herzberg – la Esperanto-urbo jam ekzistas pli ol 40 konstantaj Esperanto-objektoj. Je nomo de la Esperanto-movado ni dankas al la kunfinancantoj kaj subtenantoj.

Ekzemple la unuajn 12 vojindikilojn „Esperanto-Centro“ kaj asocian ŝildon (Germana Esperanto-Centro) kunfinancis GEA. La ŝildon sur la Domo de la Renkontiĝo pagis Otto Kern. La grandan dulingvan bonvenigŝildon ĉe Turisma kaj Kulturoficejo en la Malnova Urbodomo financis la urboadministracio kune kun „Frössel-Stiftung“, la Joachim Gießner-memorejon ĉe la stacidomo (minejtrajncareto kun du bonvenigtabuloj en Esperanto) organizis GEFA + BSW.

La novan 7-kilometran promenadrandvojon en Herzberg „Akvo-8“ (pro la aspekto kiel cifero 8) kun 18 ŝildoj kun resumaj tekstoj en Esperanto financis „Futurateliero“ kune kun la urbo Herzberg. Do jam ekzistas 36 esperantoenhavaj konstantaj etaj kaj grandaj objektoj.

Krome disponeblas jam la unuaj esperantlingvaj manĝokartoj de la restoracioj: Grosser Knollen, Zur Linde, Greka restoracio Akropolis. Krome en la restoracio Akropolis haveblas Esperantosalato (ŝaffromaĝo kun verdaj legomoj kaj Esperanto-stelo el verda kapsiko). Nova Esperanto-objekto numero 41 estas la oficiala dulingva ŝildo de la urba biblioteko Herzberg – la Esperanto-urbo kun la malfermtempoj.

Ni dankas ankaŭ al la ĝisnunaj subtenantoj kaj tradukantoj de manĝokartoj, ekz. Gian Carlo Fighiera, Dirk Bindmann, Klaus Leith kaj Thomas Sandner. Baldaŭ sekvos novaj manĝokartoj. Pluaj objektoj en la Esperanto-modelurbo dependas ankaŭ de viaj ideoj, praktikaj subtenoj kaj financado.

Bonvolu rigardi la novajn fotojn ekz. de la Esperanto-objektoj sub fotoalbumo de ic-herzberg.de

Kunkreu vian novan Esperanto-urbon!

*Petro Zilvar, Marika Frense,
Zsófia Kóródy
kaj la ICH-teamo*

Malkovru viajn antaŭjuĝojn

85a GEK

Essen

08.-12.05.2008

Por ĉiuj, kiuj ŝatas inteligentajn diskutadojn

La aranĝo do estas por ĉiuj, kiuj ŝatas, iam kaj iam, prelegojn, inteligentajn diskutadojn kaj interparoladojn kun ĉiuaĝaj homoj, pli aŭ malpli famaj. „Malkovru viajn antaŭjuĝojn” – Tio estas la titolo de la 85a Germana Esperanto-Kongreso en Essen. Tiu titolo bone taŭgas por kongreso en Essen, ĉar la bildo pri tiu urbo estas forte ligita kun la antaŭjuĝoj pri la regiono Ruhrgebiet: Essen estas en la mezo de la Ruhrregiono, plena de nigraj turoj kaj malpura laboro. Sed ne nur. Essen intertempe ankaŭ havas tre verdajn kvartalojn, tre vizitindajn vidindaĵojn kaj tre multajn lokojn por ripozi.

Essen estis mineja urbo dum kelkaj jardekoj, multaj konstruaĵoj pravas tiun nigran historion. En la ora tempo de la karbo Essen jam estis internacia urbo. Multe da viroj venis el diversaj orient- kaj sudeŭropaj landoj por trovi laboron en la regiono, iliaj familianoj venis poste por krei familian vivon en la nova hejmo. Pli kaj pli la minado ne plu estis profitdona, ĝi same kiel la fera industrio perdis sian gravecon, la homoj perdis siajn laborpostenojn aŭ se eble pli kaj pli ŝanĝis al oficejaj laborlokoj.

Hodiaŭ Essen estas urbo de multaj grandaj oficejaj turoj. Bankoj, grandaj firmaoj kaj meze en ĝi la turo de la urbodomo influas la urbocentron de Essen. Multaj homoj el la ĉirkaŭa regiono venas ĉiumatene al la urbo por labori ĉi tie. Tamen Essen konservis la vizaĝon de la laboro, en la urboparto ofte troviĝas etaj ministaj loĝodomoj. Ankaŭ krom tio Essen estas tre diverseca urbo: Tri grandaj teatroj kaj koncertoj troviĝas en la urbomezo, diversaj etaj krome. La fama kinejo Lichtburg estas konata el la televido.

Essen havas grandan piediran zonon por ĉies gusto kaj nun konstruiĝas granda nova aĉetumtempo en la urbo-mezo.

Ankaŭ religie Essen montras sian diversecon. Apud la ĉefa katolika katedralo troviĝas la sinagogo. Ankaŭ moskeo troviĝas en la norda parto. En la nuna tempo la diversnaciaj laboristoj de la tiama industria tempo kaj iliaj idoj influas la multkulturan vivmanieron de Essen. En la urbo troviĝas multaj etaj budoj kun tradiciaj manĝaĵoj, vestaĵoj kaj ornamaĵoj de la diversaj kulturcirkloj.

La Germana Esperanto-Kongreso prezentas diversajn interesajn temojn, pri-traktatajn per prelegoj kaj diskuttrondoj kaj spertindan vesperan programon. Venu kaj aŭskultu la prelegojn de gravuloj de la germana kaj internacia Esperanto-movadoj kaj ĝuu koncertojn.

Andreas Diemel

Plene Provizora Programo

Jaŭdon 08.05.2008

19.00 gvidadeto tra la urbocentro
(por frualvenintoj)

Vendredon 09.05.2008

14.00 Akceptejo malfermita
15.30 Frualvenintoj: Promenado
19.00 Solena Malfermo
20.00 Interrekona babilado

Sabaton 10.05.2008

09.30 Festprelego
12.30 Tagmanĝo (inkl. en la kotizo)
13.30/14.30/15.30 Prelego
Fakaj kunvenoj
16.30 Diservo
18.00 Vespermanĝo laŭ propra elekto
20.00 Vespera Programo

Dimanĉon 11.05.2008

10.00 Jarkunveno de GEA
10.00 Turisma alternativo por gastoj, kiuj ne vizitas la GEA-jarkunvenon
12.30 Tagmanĝo (inkl. en la kotizo)
13.30 Ekskursoj (inkl. en la kotizo)
18.30 Vespermanĝo laŭ propra elekto
20.00 Vespera Programo

Lundon 12.05.2008

09.30/10.30 Prelego
Fakaj kunvenoj
10.30 Baza diskuto pri agado de GEA / GEK
11.30 Solena Fermo
12.30 Komuna adiaŭa tagmanĝo
(inkl. en la kotizo)

Ekskursoj

Lago Baldeysee

Unu loko por ripozi en la granda kaj moviĝema urbo estas la lago Baldeysee en la suda parto de Essen. Tien iros nia unua ekskurso. La lago Baldeysee estas okulfrapa ekzemplo de la multaj agrablaj anguloj de la urbo. Tuj apude kaj kun rigardo lagen staras la vilao Hügel, la iama rezidejo de la fama industria familio Krupp.

Minejo Zollverein

La dua ekskurso montros la plej nigran kaj plej „malpuran“ angulon de Essen: la minejon Zollverein. Ĝi estis laborejo por miloj da ministoj en la mezo de la pasinta jarcento. Intertempe ĝi fariĝis mondheredaĵo kaj estas alloga vidindaĵo por ĉiuj Essen-turistoj. Multe da kulturaj kaj sociaj aranĝoj okazas tie. (Pro la longaj ŝtuparoj partoprenu nur homoj, kiuj ne estas ege handikapitaj.)

Haveno de Duisburg

La celo de la tria ekskurso estos la granda haveno de Duisburg. Ĝi estas la plej granda interna haveno en Eŭropo kaj transŝarĝejo por iu ajn varo dum ĝia transporto tra la mondo.

Kongresejo

La kongreso okazos en la domo de CVJM en Essen. La adreso estas: CVJM Essen e.V., Hindenburgstr. 57, 45127 Essen, www.cvjmessen.de

Aliĝo

Aliĝilo por la 85a GEK en Essen troviĝas je paĝo 2. La limdato por aliĝo je pli malalta kotizo estas la 10a de januaro 2008.

Oktobrofesta renkontiĝo en Munkeno

La Esperanto-Klubo Munkeno invitis al Oktobrofesta renkontiĝo en EineWeltHaus. Kunvenis 35 geamikoj, plejparte ne-Esperanto-parolantoj. Ni havis propran tendon kaj la Esperanto-klubo invitis al eta bavara manĝaĵo.



En EineWeltHaus la Esperanto-Klubo Munkeno festis ... Foto: Christof Noss

Ĉeestis krom la plejparto de la estraro ankaŭ gastoj el Brazilo, Francio, Ĉeĥio, Pollando, Irano kaj Singapuro. Krome ĉeestis konataj aktoro kaj portugallingva reĝisoro Ricardo Eche, muzikistoj (Viva Colonia) kaj muzikproduktisto, krome parto de la estraro de german-



... sian malgrandan Oktobrofeston.

brazila kulturasocio kaj membro de la brazila konsulejo. Ni pendigis du grandajn afiŝojn. Tiel vidis ĉiuj preterpasantoj niajn mesaĝojn, nome: „www.Esperanto.de – Wir machen Völker-verständigung“ kaj „Esperanto – bona ideo“.

Entute vidis nin pluraj mil preterpasantoj, la tendegestoj kaj – espereble – ankaŭ ĉefurbestro Christian Ude. Por nia partnera urbo Harare ni povis kolekti pli ol cent eŭrojn – espereble ankoraŭ venos kelkaj donacoj. Koran dankon!

La sekvan tagon estis la granda procesio de pli ol 8300 kostumitaj partoprenantoj. Membroj de la munkena klubo estis ĉe Lenbachbrunnen kun la transparento.

Venontjare la Esperanto-Klubo Munkeno denove festos je la unua sabato de la granda bierfesto.

Fritz Hilpert

Oktoberfest im München

Münchner Kindl nimmt auf dem Esperanto-Platz gemeinsam mit dem Ministerpräsidenten den Trachtenumzug ab.

Am Sonntag, den 23. September fand bei strahlendem Wetter der größte Trachten- und Schützenumzug der Welt statt, der traditionell am Esperanto-Platz gegenüber der Bavaria endet. Auch der Vorsitzende des Esperanto-Klubs Fritz Hilpert befand sich auf dem Esperanto-Platz und erhielt die Erlaubnis zusammen mit dem Münchner Kindl auf die Internationale Sprache zu tosten. Das Münchner Kindl, das auf einem gewaltigen festlich geschmückten Brauereiwagen dem Zug vorausritt, posierte auf dem Esperanto-Platz bei traumhaftem Wetter vor mehr als 1000 Schaulustigen und nahm den Festzug ab. Insgesamt zogen 8512 Teilnehmer, darunter 3957 Musiker, 796 Sportschützen und 414 Gebirgsschützen über den Esperanto-Platz. Später gesellten sich noch der Oberbürgermeister Christian Ude und der bayerische Ministerpräsident hinzu. Nächstes Jahr erwartet der Vorsitzende eine größere internationale Zuschauergruppe auf dem Esperanto-Platz und es wird gefeiert: 100 Jahre UEA und 850 Jahre München!

red.

Fakvortlisto pri atletik-sporto

Norbert Gütter eklaboris pri fakvortlisto pri la atletik-sporto (okaze de la venonta mondĉampionado en Japanio). Bonvolu rigardi sub <http://www.esperanto-muenchen.de/Fakvortlistoj/fakvortlistoj.html>. Gütter kaj la klubo ĝojos se vi sendas al ni plibonigproponojn.

nojn kaj eble aldonaĵojn, kiuj laŭ via impreso mankas.

Karl Breuninger

Munkena Esperanto-Junularo Japano kulturo

La 20an de novembro Christoph konatigos nin kun la japana kulturo. Ni renkontiĝos en komunuma centro en Neuperlach, bone atingebla per munkena subtera trajno. Pliaj informoj pri la vojo kaj la kroma programo troviĝas ĉe <http://www.esperantoplatz.de>

Elisabeth

100 Jahre Esperanto in Augsburg

Der „Esperanto-Sprachclub Augsburg“ feiert vom 2. bis 4. Mai 2008 im Rahmen der Frühjahrstagung der Bayerischen Esperanto-Liga sein 100-jähriges Jubiläum.



Stefanie Tucker und Armin Grötzner bei der Vorbesprechung der gemeinsamen Veranstaltung.

Das vorläufige Programm wurde bei einer Besprechung in Augsburg bereits erstellt: Freitag, 16.00: Eintreffen der Teilnehmer, 17.00: Vorstandssitzung der Bayerischen Esperanto-Liga, 20.00: Freundschaftsabend, Samstag: 9.30: Empfang im Rathaus, 11.00: Mitgliederversammlung der Bayerischen Esperanto-Liga, 15.00: Stadtrundgang / Sitzung der Fachleiter des Deutschen Esperanto-Instituts, 19.00: Festabend, Sonntag: 10.30: Eröffnung des neuen Treffpunkts des Esperanto-Sprachklubs im Bürgertreff Hochzoll.

Anmeldung bis 31. Januar bei: Esperanto-Sprachclub Augsburg, Stefanie Tucker, Breitenbergstraße 7, 86163 Augsburg, g.tucker@gmx.de

Till Dahlenburg Feinheiten in der Esperanto-Dichtkunst

(Eine einführende Erläuterung zu dem Buch „Pli lume la mallumo zumas. Stilfiguroj en la poezio de esperanto“. Esperantlingva vortaro kun difinoj kaj ilustraĵoj el la internacia poemkreado. Novjorko 2006, Mondial, 215 S. ISBN 1-59569-057-3)

Können Sie, verehrter Leser, ein Esperanto-Gedicht auswendig, ohne weitere Vorbereitungen, darbieten? Ob die Antwort nun Ja oder Nein lautet – an ein bestimmtes Gedicht werden Sie sich wohl erinnern, das Ihnen besonders zugesagt, gefallen hat, das Sie tief berührt hat. Für mich ist „Venton serĉas velo“ aus „Maja Idilio“ von Kálmán Kalocsay ein derartiges Werk; es ist zwar kurz, besteht nur aus acht Zeilen, übt aber eine ungewohnte Anziehungskraft auf mich aus:

Venton serĉas velo,
sunon la vinber',
floron la abelo,
maron la river'.
Flamon serĉas la tineo
por plezuro kaj perejo,
sinon serĉas sin',
kaj mi serĉas vin.

(Kökény, 1966 :119)

Die vermutbare Aussage allein – ich liebe dich über alles in der Welt – ist sicher nicht ausschlaggebend für die Aufmerksamkeit, die der Dichter mit diesen Zeilen erzielt; es ist vielmehr die Wahl der Ausdrucksmittel und die Gestaltung der Sprache, die dieses Gedicht so außerordentlich erscheinen lassen. Abgesehen von der Rhythmik und dem Reim fällt bei näherer Betrachtung eine nuancierte Wort- und Satzbehandlung auf:

So tritt das menschliche Ich erst in der vorletzten, vielleicht sogar erst in der letzten Zeile in Erscheinung, nachdem Naturerscheinungen, Tiere, Pflanzen, Gegenstände zueinander in Beziehung gesetzt wurden; der Gegensatz zwischen Aufleben und Untergang wird angedeutet, bevor alle diese Skizzen auch in die Bestimmung und in das Fühlen zweier sich Liebender einfließen;

die Satzgliedfolge wird zum endlichen Höhepunkt umgestellt – aus der Folge Objekt–Prädikat–Subjekt (in den Zeilen 1 bis 7) wird die Folge Subjekt–Prädikat–Objekt (in der letzten Zeile).

Der Verfasser dieses Gedichtes mag diese Vergleiche und Strukturen rein gefühlsmäßig verwendet haben, für die Beurteilung der Leistungsfähigkeit einer bestimmten Sprache aber ist die Analyse und das Bewusstmachen der dieser Sprache eigenen gestalterischen Möglichkeiten wichtig. Dies gilt um so mehr, als wir bezüglich der Einschätzung der geplanten Sprache Esperanto sehr häufig auf das Vorurteil treffen, diese Sprache eigne sich kaum zur Wiedergabe oder gar zur Schaffung dichterischer Werke, geschweige denn von Lyrik. Natürlich musste und muss für diese höchst kreativ zu erbringende sprachliche Leistung auf die geeignete Person gewartet werden, die diese Sprache so beherrscht, um sie dem Inhalt entsprechend formen zu können. Hermann Hesse schreibt:

„Denn es kommt bei einem Gedicht nicht darauf an, ob der Dichter seine gute Laune oder seine Verzweiflung mitteilt, sondern einzig darauf, ob er das, was Inhalt seines Gedichts ist, wirklich hat sagen und gestalten können.“

(Hermann Hesse, An Wiegand, 9.4.1929; zitiert nach: Gutknecht, 1999 : 107)

So ist es dann vielleicht eine nützliche Aufgabe, die oben angedeuteten Gestaltungsformen in der Sprache der Lyrik zum Anlass zu nehmen, diese sog. Stilformen (auch Stilfiguren oder rhetorische Figuren genannt) umfangreicher zu behandeln und mit Beispielen aus der Original- und Übersetzungslyrik des Esperanto zu belegen, wie ich es mit der Sammlung „Pli lume la mallumo zumas. Stilfiguroj en la poezio de esperanto“ versucht habe.

Hier will ich anhand des Gedichtes von Kalocsay nur eine kleine Probe der Vielfalt von Stilfiguren zeigen, um Sie anzuregen, gute Esperanto-Lyrik einzubeziehen in eine den Geist und die Sinne öffnende Sprachunterweisung.

Betrachten wir die ins Auge fallenden Phänomene im einzelnen:

1. Der Gegensatz in der Satzgliedstellung allein im Vergleich der ersten mit der letzten Zeile ist evident und lässt die Betonung ganz auf die andere, die angesprochene Person fallen. Dieser Starkton wäre kaum erzielbar, wenn auch die vorangegangenen Zeilen die normale Satzgliedstellung (Subjekt–Prädikat–Objekt) aufweisen würden. Nun ließe sich ja auch die umgekehrte Anwendung der Satzgliedstellungen denken, also mit Ausnahme der letzten Zeile die normale Satzgliedfolge und in der letzten Zeile die Umkehrung der Normalform (*vin serĉas mi.*) – dabei wäre jedoch bei der getroffenen Wortwahl – und diese ist inhaltsbestimmend! – schwerlich ein abwechslungsreicher Reim zustande gekommen (*venton / sunon; floron / maron; flamon / sinon*), was sicherlich auch der grammatischen Mono-Struktur des Esperanto geschuldet ist.

2. Das Prädikat bleibt in allen sieben Aussagen dasselbe (*serĉas*), es wird aber nicht immer wiederholt, in den anfänglichen Vergleichshandlungen (*sunon la vinber'; floron la abelo; maron la river'*) ist es in Gedanken zu ergänzen. Auffallend ist die nachdrückliche Wiederholung des Wortes *serĉas* in der zweiten Hälfte des Gedichtes, also zum Höhepunkt hin, der bereits mit *por plezuro kaj perejo* eingeleitet wird.

3. Der Mensch in Gestalt des Ich und Du tritt erst zum Schluss auf und dürfte als das für den Dichter wichtigste Glied in der Aufzählung gelten. Wind, Sonne, Blüte, Feuer als Ziele sowie Tiere und Pflanzen als handelnde Wesen gehen ihm voran – doch halt!: bereits in der ersten Zeile wird der Mensch, vertreten durch das Segel als eines seiner Werke, ins Gedankenspiel gebracht.

4. Die mögliche, nein die notwendige Gegensätzlichkeit von Handlung und Wirkung wird mit den Worten *por plezuro kaj perejo* ausgedrückt, bei der Motte (*tineo*) fast selbstverständlich, bei der echten Liebe zwischen zwei Menschen im übertragenen Sinne durchaus nachfühlbar.

5. Die fast übergangslose Aneinanderreihung der Aussagen (...*velo*, / *sunon*...; ...*vinber*' / *floron* ...; ...*abelo*, / *maron* ...), also ohne Einschaltung von Konjunktionen des Vergleichs (etwa: *kiel* *tiel*) oder der Aufzählung (*kaj*, *aŭ*), schafft eine besondere Präzision. Desto vergleichswirksamer wird die erst den letzten beiden Aussagen vorbehaltene Konjunktion *kaj*. (Das zwischen *plezuro* und *pereo* stehende *kaj* verbindet dagegen lediglich zwei gleichartige Wörter.)

6. Die Parallelgruppierung von Beobachtungs- und Gefühlsaussagen (Naturerscheinungen, Pflanzen- und Tierwelt, menschliche Zuneigung) kommt einem Vergleich nahe; dieser wird aber nicht durch ein besonderes Vergleichswort signalisiert, so dass mehr als ein bloßer Vergleich angestrebt wird, nämlich eine Art von Gleichsetzung, eine gewisse Identität aller Beobachtungen und Gefühle.

7. Der übergeordnete Titel *Maja Idilio* könnte auf den ersten Blick hin zweideutig sein, denn die Verbindung eines attributiven Adjektivs mit einem Substantiv mag im allgemeinen Esperanto-Sprachgebrauch als Ersatz für die Verbindung eines Substantivs mit einem substantivischen Genitivattribut (also: *Idilio de Majo*) gelten. Allerdings – bei der bekanntermaßen sorgfältigen Sprachbehandlung durch *Kálmán Kalocsay* – dürfte mit der Wahl Adjektiv + Substantiv eine Aufhebung des auf den einzelnen Monat Mai bezogenen Impulses auf ein verallgemeinerbares Gefühlsniveau mit eben dieser Frühlingskraft empfunden sein.

Die hiermit zunächst nur vage ange deuteten Besonderheiten der sprachfigurlichen Gestaltung erhalten eine Konkretisierung bei einem Abgleich mit einschlägigen Lexika, z.B. mit dem empfehlenswerten „Lexikon der Sprachkunst“ von *J. Dominik Harjung* (Harjung, 2000), das sich aber hinsichtlich der Beispiele ausschließlich auf die deutsche Literatur bezieht. Auf mehrere Nachschlagewerke ähnlicher Art aus dem englischsprachigen Raum weist *Baldur Ragnarsson* in einer Be-

sprechung meiner Veröffentlichung hin (Zeitschrift „Esperanto“, n-ro 1204, aprilo 2007, S. 87 f.) und macht, mit Recht, nachdrücklich darauf aufmerksam, dass in den Definitionen der einzelnen Stilfiguren zwischen den Autoren der verschiedenen Übersichts darstellungen gewisse Unterschiede zu bemerken sind. Insofern stellen die von mir auf der Grundlage mehrerer Lexika zusammengestellten Definitionen der Stilfiguren lediglich einen Ansatz dar, die Esperanto-Poesie auf diese Elemente hin zu untersuchen.

Den oben skizzierten sieben Auffälligkeiten in der sprachlichen Gestaltung des Gedichtes lassen sich zumindest folgende Stilfiguren zuordnen (die Formulierungen sind, unwesentlich gekürzt, dem Buch „*Pli lume la mallumo*“ zumas. Stilfiguroj en la poezio de esperanto“ entnommen; die im Buch angeführten literarischen Beispiele werden hier nicht zitiert):

ANASTROFO = INVERSIO: *Ŝanĝo de la kutima ordo de la frazelementoj, aŭ sintakse deviga* (ekz. en la germana lingvo *inversio de la subjekto en demanda frazo*), aŭ *retorika* (ekz. *inversio de la predikativo en Esperanto: modesta estis nia kunveno*).

ELIPSO: *Procedo, konsistanta en la ellaso de lingvaj eroj, sintakse necesaj, sed subkomprenataj pro la frazkonstruo aŭ la komunika situacio*; ekz. *mi vidis lin, ne vin*.

GRADACIO: *Retorika procedo, per kiu oni ordigas la ideojn laŭ la interna forto kaj eldiras ilin unu post la alia, tiel ke la plej fortrefika staras je la fino*; ekz. *Zamenhof estis nobla en animo, granda en pensoj, genia en intuicio*.

ANTITEZO: *Stilfiguro, per kiu oni kontraŭmetas du malajn vortojn aŭ ideojn, por plireliefi ilin*, ekz. *feliĉo venas gute, malfeliĉo venas flue aŭ malgranda aspekte, sed granda intelekto*.

PARATAKSO: *Sintaksa procedo, per kiu oni metas la propoziciojn unu apud la alia, sen ia ligilo, konjunkcio aŭ subjunkcio* (ekz.: *vi diru, li petolas tro sovaĝe anstataŭ: vi diru, ke li ...*).

SIMILAĴO: *Tiagrada komparo inter*

du fenomenoj, ke la simileco estu tute natura kaj kvazaŭ verŝajna.

HIPALAGO: *Stilfiguro, per kiu oni atribuas al vorto kvalifikon, kiu logike konvenas al tutproksima ideo*. Ankaŭ: *Interŝanĝo de atributiva adjektivo kun atributiva genitivo kaj inverse*.

Bei genauerem Hinsehen ließen sich noch weitere Stilfiguren benennen, man denke nur an die im Gedicht spürbare Übertragung menschlicher Eigenschaften auf Tiere (ANTROPOMORFISMO), an die Gegensätzlichkeit des Satzbaus im Anfangs- und im Endsatz (KIASMO) oder an die Gleichförmigkeit fast aller Aussagen in ihrer Struktur (PARALELISMO).

Die Erschließung des Inhaltes, der Aussage, des Sinns eines literarischen Werkes ist wesentlich auch von der Form abhängig, in der dieses Werk dargeboten wird. Ohne Kenntnis der **möglichen** Formelemente dürfte dem Leser / Hörer vielleicht manches unerschlossen bleiben.

So ist das Öffnen der Schatztruhe der Stilfiguren wohl eine der Voraussetzungen, damit die Kreativität auch der Esperanto-Dichter (bezogen sowohl auf Original- als auch auf Übersetzungsliteratur) angemessen gewürdigt werden kann. Für die sprachpraktische Weiterbildung im Fach Esperanto dürften sich dabei Denkprozesse ergeben, Kenntnisse und Erkenntnisse einstellen, die auf artverwandte Gebiete, außerhalb dieser Plansprache, übertragbar sind.

Literaturangaben:

Gutknecht, Christoph (Hrsg.; 1999): *Lauter Worte über Worte. Runde und spitze Gedanken über Sprache und Literatur*. München, Beck, 390 S.

Harjung, J. Dominik (2000): *Lexikon der Sprachkunst. Die rhetorischen Stilformen. Mit über 1000 Beispielen*. München, Beck, 478 S.

Kököny, Ludoviko (Hrsg.; 1966): *Ora duopo. Jubilea Libro pri Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay*. Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 184 S.

Brüel, den 28.07.2007

Dr. Till-Dietrich Dahlenburg
Feldstraße 13
19412 Brüel